



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 263

Marto, 2008

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — Kompostisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

## Kiel Oni Eniras La Ĉielon?

Mi ekzamenis la infanojn de mia preĝeja lernejo por ekscii, ĉu ili bone komprenas la koncepton de la eniro en la ĉielon.

Mi demandis al ili, „Se mi vendus la proprajn domon kaj aŭton, kaj vendus miajn havaĵojn kaj donus ĉiom de mia mono al la eklezio, ĉu mi rajtus eniri la ĉielon?”

„NE!” respondis la infanoj.

„Se mi ĉiutage purigus la preĝejon, tondus la gazonon, kaj zorgus pri tio, ke ĉio estus pura kaj en ordo, ĉu mi rajtus eniri la ĉielon?”

Refoje, la respondo estis „NE!” Mi komencis rideti; mi ĝuis la sperton.

„Nu, se mi estus afabla al la bestoj kaj donus bombonojn al ĉiuj de la infanoj, kaj amus la edzon, ĉu tiam mi rajtus eniri la ĉielon?”

Refoje, ili ĉiuj respondis „NE!” Mi fieregis pro ili.

„Kiel do,” mi daŭris, „mi rajtus eniri la ĉielon?”

Ses-jarulo respondis, „Vi devas esti mortinta.”

— trovita en la interreto

## La Redaktoro Refoje Pardonpetas

Denove la unuaj numeroj de ĉi tiu jaro ege malfruas. Tamen, kun la printempo floras denove kaj finfine ankaŭ nia gazeteto. Ni multe esperas, ke vi ŝatas tion, kion vi vidas. Se jes, bonvolu diri tion al ni. Se ne, bonvolu diri ankaŭ tion al ni, mi petas.

## La Forpaso de Claude Piron (1931-2008)

Kun granda malĝojo ni ekscias, ke la mondo perdis grandan verkiston kaj grandan amikon, Claude Piron. Liaj verkoj, liaj konsiloj pri la rilato kun neesperantistoj, liaj prelegoj, lia amikema maniero donis multon al la movado kaj al niaj ĝuoj kaj agadoj. Lia forpaso estas granda perdo, kaj ni ĉiam memoros lin.

Kia perdo, kiu frapis nin subite.

Kiam mi kiel komencanto komencis legi la libron, *Gerda Malaperis*, mi sentis min mem en la rakonto. Tio estis la unua libro, en kiu mi sentis la veran ĉeestecon kun la homoj en la rakonto: Bob, Tom, kaj Linda. Tiam mi ekkomprenis, ke Esperanto estas riĉa lingvo, kiel aliaj lingvoj, kaj eble eĉ pli riĉa ol aliaj lingvoj. Multaj homoj legas liajn verkojn, spektas la filmon, *Gerda Malaperis*, de Brazilo, kaj nun eĉ vidas bonegan prelegon ĉe YouTube.\*

En *Gerda Malaperis*, ĉapitro ok, Linda pensis: „Ĉu mi sekvu lin al la urbo? Ĉu mi sekvu lin en la urbon? Ĉu mi sekvu lin en la urbo?”

Tiuj simplaj pensoj instruis min, kiel komencanton. Ili metis min pli forte en la pensojn de Linda. Tio donis al mi senton de la graveco de la situacio, en kiu Linda subite troviĝis. La etaj ŝanĝoj en la demandoj montris al mi, ke Linda devas pensi pri kiel kuraĝa ŝi estu por sekvi lin, kaj finfine ŝi devis fari ĉion por sekvi tiun malbonulon. Tiajn punktojn Claude Piron verkis por komencantoj, samtempe kaj por instrui kaj por distri. Claude Piron estis aparte brila verkisto por komencantoj, sed ankaŭ liaj aliaj verkoj meritas legadon.

Mi aŭskultis la prelegojn de Claude Piron per Pola Radio. Ni ofte diskutis lin ĉe nia loka grupo, la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso.

Ni, multaj samideanoj, estas en unu unuiĝinta koro por senti la malĝojigan forpason de Claude Piron.

S-ro Piron, ni ofte uzas viajn utilajn verkojn. Ripozu en paco, kaj sciu, ke ni memoras vin.

Nome de Esperanto-USA  
Filipo DORCAS, prezidanto  
(2008-01-23)

[http://dotsub.com/films/thelanguage/index.php?autostart=true&language\\_setting=eo\\_1683](http://dotsub.com/films/thelanguage/index.php?autostart=true&language_setting=eo_1683)

Ĉi tiun tujan reagon oni ankoraŭ povas trovi en la retejo de Esperanto USA ĉe <http://esperanto-usa.org/en/node/1044>. Por pli intima pritrakto de la multaj kontribuoj faritaj de Claude Piron, bonvolu legi la martan numeron de la revuo *Esperanto* (“Claude Piron ne plu inter ni”).

\* [http://www.youtube.com/watch?v\\_=YHALnLV9XU](http://www.youtube.com/watch?v_=YHALnLV9XU)

## DON HARLOW (1942 - 2008)

Donald James Harlow, denaska oregonano kaj longdaŭra loĝanto de Kalifornio, mortis dimanĉon, la 27-an de januaro 2008 pro kancero. Li estis amata edzo, patro, avo, onklo kaj frato, kiun oni memoros pro sia granda intelekto, inspira pasio por la lingvo Esperanto, amo de naturo, kaj oftaj leteroj al la redaktoroj.

Donald naskiĝis la 8an de julio 1942 en Portland, Oregono. Dum siaj gimnaziaj jaroj li vojaĝis al Danio, kie li unufoje fiere parolis Esperanton lernintan el libro. Ĉe la Kalifornia Instituto de Teknologio li akiris licencion pri astronomio.

Li renkontis kaj edziĝis kun Angela en 1964 kaj enskribiĝis en la aerarmeo kiel meteorologo. Oni postenigis lin en Teksaso, Suda Karolinio, Anglio kaj Kalifornio, kaj li akiris la rangon de kapitano.

Post la deĵoro en la aerarmeo li denove studis astronomion ĉe la Universitato de Kalifornio en Berkeley, ĝis li fariĝis direktoro de ELNA (nuntempe Esperanto USA). Li fariĝis informadikisto dum pli ol du jardekoj, kaj poste revenis al ELNA por labori ĝis la jaro antaŭ sia morto.

Li multflanke agadis en la Esperanto-komunumo; li servis kiel prezidanto kaj estrarano de ELNA, instruis kursojn ĉe lokaj universitatoj, ĉeestis internaciajn kongresojn, verkis originalajn verkojn, kaj faris tradukojn de prozo kaj poemoj en kaj el Esperanto. Aparte plaĉis al li originalaj verkoj esperantlingvaj.

Oni prezentis al li la Premion Deguĉi el Japanio por literaturo, kaj UEA donis apartan premion por elstara kontribuo al la interreto. Lia retloko por esperanta literaturo estas unu el la plej konataj kaj respektataj en la mondo.\*

En 2007, oni nomis la premion de ELNA por la traduko de usona literaturo en Esperanton por li – la Premio Harlow. Li fariĝis honora dumviva membro de Esperanto USA.

Inter liaj dumvivaj pasioj, krom la vastskalaj atingoj por antaŭenigi Esperanton, estis scienc-fikciaj kaj fantaziaj romanoj; la studado de astronomio; la solvado de fizikaj ekvacioj por amuzo; la piedvagado; kaj la verkado de filmaj kaj literaturaj recenzoj, fikcio kaj nefikcio, kaj leteroj al la redaktoro. Li aperigis ĉion en kelkaj retlokoj kaj ret-bloĝoj.

Tradukita el la retejo <<http://harlows.org/memorial/>>

\* <http://donh.best.vwh.net/>

## PLI PRI ROZOJ

Estimata Redaktoro,

Mi gratulas pri la februara numero de *Inter Ni*, tuta numero pri rozoj. Kompreneble mi dankas ankaŭ al D-ro Margaret Furness, aŭtoro de la ĉefartikolo kaj fotisto de belaj rozoj.

Kiam la numero aperis, mi ŝance legis libron (en la angla) *The Golden Ratio* (La Ora Proporcio) fare de Mario Livio (Broadway Books, Random House, Inc. New York, 2002). (Mario Livio estas eminenta fizikisto kiu laboras pri la kosmo-teleskopo Hubble.) Laŭ li, eĉ en la rozĝardeno, inter delikataj petaloj de belaj rozoj, oni povas vidi la faraĵojn de la „granda matematikisto”. En ĉiu rozfloro la petaloj estas spirale aranĝitaj de la plej eksteraj kaj subaj ĝis la plej enaj kaj supraj. Se oni mezuras de la mezo de unu petalo al la mezo de la sekvanta, oni trovas, ke la angulo estas proksimume 137.5°. Tiu angulo havas rilaton al la ora proporcio kaj al la nombrosekvo de Fibonacci: 1, 2, 3, 5, 8, 13, 21, 34, 55, 89, 144, ktp. La sciencistoj povas montri, ke tiu angulo estas la plej efika aranĝo por folioj, kaj kompreneble petaloj estas nur modifiĝintaj folioj.

— Steĉjo

## POST ELHOSPITALIĜO

Minacas sen averto la mort’.  
 Kelkfoje meze en la nokt’.  
 Laŭlonge d’abismo kondukas min.  
 Fali en ĝin estas la tim’!  
 Malcertas nia viv’  
 Malcertas ĝia driv’  
 Hodiaŭ nenia mizer’.  
 Kaj morgaŭ la mort’ sen toler’.  
 Sed iam al kor’ la Poeto ĝin diris,  
 li per sia saĝo nin klare inspiris:

„Memento mori  
 gibt’s genug - - -  
 Mein teurer Freund,  
 nach deiner Art  
 Nur vivere memento!”

— Hein Wernik

Noto: La aŭtoro, Hein Wernik, citas la plej faman germanan poeton: Johann Wolfgang Goethe, 1749-1832.

Klarigoj:

Memento mori: Memoru morti.  
 gibt’s genug: estas sufiĉe.  
 Mein teurer Freund, nach deiner Art: Mia kara amiko, laŭ via naturo.  
 vivere memento: memoru vivi.

Vidita antaŭ sepultistejo:

Veturigu zorgeme. Ni atendos.

